# Paŝoj al interna paco

### Harmoniaj principoj por homa vivado
### de Paco Pilgrimulo

**Frue en mia vivo** mi faris du tre gravajn malkovrojn. Unue mi eltrovis, ke gajni monon estis facila. Due mi eltrovis, ke gajni monon, kaj elspezi ĝin malsaĝe estis tute senvalora. Mi sciis, ke mi ne estis ĉi tie por tio. Tiutempe (tio estis antaŭ multaj jaroj) mi ne sciis ĝuste, kial mi estas ĉi tie. Nur per tre profunda serĉado por sencoplena vivo, kaj post tutnokta marŝado tra la abaro, mi eltrovis tion, kion mi nun komprenas kiel gravan psikologian obstaklon. Mi sentis tutan volontecon sen ia ajn hezito doni mian vivon, dediĉi mian vivon al servo. Mi diras al vi, estas punkto sen reiro. Post tio, vi neniam povas reiri al tute mem-centrita vivo.

Kaj tiel mi iris en la duan fazon de mia vivo. Mi komencis vivi por *doni* tion, kion mi povis, anstataŭ *ricevi* tion, kion mi povis, kaj eniris novan kaj mirindan mondon. Mia vivo ekiĝis sencoplena. Mi atingis la grandan benon de bona sano; nehavinte malvarmumon aŭ kapdoloron ekde tiam (La plej multaj malsanoj estas kaŭzitaj psike). De tiu tempo mi sciadis, ke mia vivotasko estus la laboro por paco; ke ĝi kovrus la tutan pacobildon- paco inter nacioj, paco inter grupoj, paco inter individuoj, kaj la tre grava interna paco. Tamen estas granda malsameco inter voli doni vian vivon kaj efektive doni vian vivon, kaj por mi, dek kvin jaroj de preparado kaj interna serĉado intervenis.

Dum tiu tempo mi konatiĝis kun tio, kio la psikologistoj nomas *egoon* kaj *konsciencon.* Mi ekkonsciis, estas kvazaŭ ni havas du memojn aŭ du naturojn, aŭ du volojn kun du malsamaj vidpunktoj. Ĉar la vidpunktoj estis tiel malsamaj, mi sentis lukton en mia vivo dum tiu periodo inter la du memoj kun la du vidpunktoj. Do estis montoj kaj valoj- multegaj montoj kaj valoj. Tiam, en la mezo de la lukto venis mirinda montpinta sperto, kaj la unuan fojon mi sciis, kion signifas interna paco. Mi sentis unuecon- unuecon kun ĉiuj

miaj kunhomaj estaĵoj, unuecon kun la tuta kreitaĵaro. Ekde tiam mi neniam sentis min vere dividita. Mi povis reveni denove kaj denove al tiu mirinda montpinto, kaj tiam mi povis resti tie dum pli kaj pli longaj tempoperiodoj, kaj nur okaze elglitis. Tiam venis mirinda mateno, kiam mi vekiĝis kaj eksciis, ke mi neniam devus denove malsupreniri en la valon. Mi sciis, ke por mi la lukto estis finita, ke fine mi sukcesis pri doni mian vivon, aŭ trovi internan pacon. Denove tio estas punkto de nereveno. Vi neniam denove eniras la lukton. La lukto estas finita, ĉar vi *far*os la ĝustan agon, kaj vi ne bezonas esti puŝita al ĝi.

Tamen, progreso ne estas finita. Granda progreso okazis en tiu tria fazo de mia vivo, sed estas kvazaŭ la centra figuro de la vivopuzlo estas kompleta kaj klara kaj ne ŝanĝiĝanta, kaj je la randoj aliaj pecoj ĝuste enmetiĝas. Ĉiam kreskas la rando, sed la progreso estas harmonia. Estas sento de ĉiam esti ĉirkaŭataj je ĉiuj bonaj aĵoj, kiel amo kaj paco kaj ĝojo. Ŝajnas kiel protekta ĉirkaŭaĵo, kaj estas interna neskuebleco, kiu kondukas vin tra iu ajn situacio, kiun vi eble konfrontas.

La mondo eble regardas al vi kaj pensas, ke vi alfrontas grandajn problemojn, sed ĉiam estas la internaj rimedoj por facile solvi tiujn problemojn. Nenio ŝajnas malfacila. Ekzistas trankvilo kaj sereneco kaj malrapideco- ne plu strebado kaj penado pri iu ajn. La vivo estas plena kaj la vivo estas bona, sed la vivo estas neniam plu tro plena. Jen tre grava afero, kiun mi komprenis: Se via vivo akordiĝas kun via parto en la Vivo-Desegno, kaj se vi obeas la leĝojn, kiuj regas tiun ĉi universon, tiam via vivo estas plena kaj bona, sed ne superplena. Se ĝi superplenas, tiam vi faras pli ol estas ĝusta por vi, pli ol la tasko demandita de vi en la totala skemo de aferoj.

Jen vivo por doni anstataŭ por akiri. Dum vi koncentriĝas pri doni, vi konstatas, ke kiel vi ne povas ricevi sen doni, tiel do vi nek povas doni sen ricevi- eĉ la plej mirindajn aĵojn, kiel sanon kaj feliĉon kaj internan pacon. Jen sento de *senfina energio*- ĝi simple neniam elĉerpiĝas; kvazaŭ senfina kiel aero. Vi ŝajne estas ligita al la fonto de la universala energio.

Vi nun regas vian vivon. Vi komprenas, ke la egoo neniam regas. La egoo estas regataj de deziroj por komforto kaj oportuneco flanke de la korpo, de mensaj postuloj kaj de emociaj erupcioj. Sed la pli alta naturo regas la korpon, la interlekton kaj la emociojn. Mi povas diri al mia korpo: "Kuŝiĝu tie sur tiu cementa planko kaj dormu", kaj ĝi obeas. Mi povas diri al mia menso: "Elŝaltu ĉion kaj koncentriĝu pri tiu tasko antaŭ vi", kaj ĝi obeas. Mi povas diri al miaj emocioj: "Kvietiĝu, eĉ malgraŭ ĉi tiu terura situacio", kaj ili kvietiĝas. Estas malsama maniero vivi. La filozofo Thoreau skribis: "*Se homo ne samemarŝas kiel siaj kunuloj, eble li aŭdas malsaman tamburanton"*. Kaj nun *vi* sekvas malsaman tamburiston- la pli altan naturon anstataŭ la pli malaltan.

**Estis** nur tiutempe, en la jaro 1953, ke mi sentis min kondukita aŭ vokita aŭ motivita komenci mian pilgrimon por monda paco-vojaĝo enteprenita laŭ la tradicio. La tradicio de pilgrimo estas vojaĝo piede kaj kredante enteprenata, preĝplena, kaj kiel okazo renkonti homojn. Mi vestiĝas per surskribita tuniko por kontakti homojn. Oni legas fronte: "Paco Pilgrimulo". Mi sentas, ke tio nun estas mia nomo- ĝi emfazas mian mision anstataŭ min mem. Kaj sur la dorso oni legas "25.000 mejloj piede por paco". La sola celo de la tuniko por mi estas kontakti homojn. Dum mi marŝadas laŭ la ŝoseoj kaj tra la urboj, homoj proksimiĝas al mi kaj mi havas ŝancon paroli kun ili pri paco.

Mi jam piediris 25.000 mejlojn kiel senmona pilgrimulo. Mi posedas nur tion, per kio mi vestiĝas kaj kion mi portas en miaj malgrandaj poŝoj. Mi apartenas al neniu organizo. Mi diris, ke mi marŝos ĝis oni donas al mi tranoktejon, kaj fastos ĝis estas donata manĝaĵon, ke mi restos vagabondo ĝis la homaro lernu sekvi la vojon al paco. Kaj mi povas fidele diri al vi, ke sen iam ajn demandi pri io, mi estis provizita per ĉio ajn bezonata por mia vojaĝo, kio montras al vi, ke homoj estas vere bonaj.

Ĉiam mi kunportas mian pacomesaĝon: *Tiu ĉi estas la vojo de paco: Venku la malbonon per bono, la mensogon per vero, kaj la malamon per amo.* Estas nenio nova pri tiu mesaĝo, krom la

praktikado de ĝi. Kaj la praktikado de ĝi estas bezonata ne sole en la internacia situacio, sed ankaŭ en la persona situacio. Mi kredas, ke la situacio en la mondo estas reflekto de nia propra malmatureco. Se ni estus maturaj, harmoniaj homoj, milito estus nenia ajn problemo, ĝi estus malebla.

Ni ĉiuj povas laboradi por paco. Ni povas labori ĝuste, kie ni estas, ĝuste interne de ni mem, ĉar ju pli da paco ni havas en nia propra vivo, des pli ni povas reflekti al la ekstera situacio. Fakte, mi kredas, ke la deziro *postvivi* puŝos nin al ia nestabila monda paco, kiu tiam bezonos esti suportata de granda interna vekiĝo, se ĝi daŭru. Mi kredas, ke ni eniris novan epokon, kiam ni malkovris nuklean energion, kaj ke tiu ĉi nova epoko postulas novan renecancon por levi nin al pli alta komprennivelo, tiel ke ni kapablos alfronti la problemojn de tiu ĉi nova epoko. Do unuavice mia temo estas pri paco interne de ni mem, kiel paŝo al paco en nia mondo.

**Nu,** kiam mi parolas pri la paŝoj al interna paco, mi parolas pri ili, por ke vi komprenu min en kadro, sed estas nenio arbitra ĉe la numero de paŝoj. Ili povas esti etenditaj, ili povas esti maletenditaj. Tiu simple estas vojo por paroli pri la subjekto, sed estas grava: la paŝoj al interna paco ne estas prenitaj en iu ajn fiksita ordo. La *unua paŝo* por iu povus esti la *lasta paŝo* por alia. Simple prenu iu ajn paŝon, kiu ŝajnas plej facila por vi, kaj ju pli da paŝoj vi faras, des pli facile vi faros pliajn. Pri tio ni vere povas interŝanĝi nin. Eble neniu el vi sentu sin gvidata al pilgrimo, kaj mi ne provas inspiri vin marŝadi pilgrimon, sed pri la kampo de kie ni trovu harmonion por nia propra vivo, ni ankaŭ povas interŝanĝi nin. Kaj mi suspektas, ke se vi aŭdas min doni kelkajn paŝojn por la interna paco, vi rekonos ilin kiel paŝojn, kiujn vi ankaŭ prenis.

Unuavice mi volus mencii kelkajn preparojn, kiuj estis postulitaj de mi. La unua preparo estas *ĝusta sinteno al la vivo.* Tiu signifas: ĉesu esti eskapanto! Ĉesu esti surfaco- vivanto, starante ĝuste sur la ŝaŭmo de la surfaco. Ekzistas milionoj da tiaj homoj, kaj ili neniam trovas ion ajn efektive indan. Voleme alfrontu vivon rekte,

kaj penetru la surfacon de la vivo, kie estas trovataj la veroj kaj la efektivecoj. Estas tio, kion ni nun faras ĉi tie.

Jen la afero pri sencohava sinteno al la problemoj, kiujn la vivo prezentas al vi. Se vi povus vidi la tutan bildon, se vi scius la tutan rakonton, vi ekscius, ke neniu problemo iom ajn venas al vi, kiu ne havas celon en via vivo, kiu ne povas kontribui al via interna kreskado. Kiam vi perceptas tion, vi rekonos problemojn kiel kaŝitajn oportunojn. Se vi ne alfrontas problemojn, vi simple drivos tra la vivo, kaj ne gajnos internan kreskadon. Dum ni solvi problemojn en akordo kun la plej alta kompreno, ni atingas internan kreskadon. Nu, kolektivajn problemojn ni devas solvi kune, kaj neniu trovas internan pacon, kiu evitas fari sian parton en la solvo de kolektivaj problemoj, kiel monda malarmo kaj mondpaco. Do ni ĉiam pensu kune pri tiuj ĉi problemoj, parolu kune pri ili kaj kolektive klopodu por solvi ilin.

La dua preparo temas pri *meti niajn vivojn en harmonion kun la leĝoj, kiuj regas tiun universon.* Kreataj ne estas sole la mondo kaj la estaĵoj, sed ankaŭ la leĝoj, kiuj regas ilin. Ili validas en la materia regno kaj en la psikologia regno kaj tiuj ĉi leĝoj regas la homan konduton. Kiom ni kapablas kompreni kaj harmoniigi nian vivon per tiuj leĝoj, tiom nia vivo estos en harmonio. Kiom ni malobeas tiujn leĝojn, tiom ni kreos malfacilojn por ni mem per nia malobeo. Ni estas niaj propraj plej malbonaj malamikoj. Se ni malharmoniĝas pro malklereco, ni suferas iom, sed kiam ni *scias pli bone* kaj ankoraŭ malharmoniĝas, tiam ni suferas multege. Mi rekonas, ke tiuj leĝoj estas bonkonataj kaj bone kredataj, kaj tial ili simple bezonas esti bonvivataj.

Do mi ekentreprenis tre interesan projekton. Tiu estis *vivi ĉiujn bonaĵojn, je kiuj mi kredis*. Mi ne konfuzis min per provi preni ilin ĉiujn samtempe, sed prefere, se mi faris ion, de kiu mi sciis, mi ne devus fari, mi ĉesis fari tion, kaj mi ĉiam rapide rezignis pri tio. Komprenu, tio estas la facila vojo. Iam post iam estas longdaŭra kaj teda. Kaj se mi ne faris ion, kion mi devus fari, mi ekokupiĝis pri tio. La vivo bezonis konsiderindan tempon por atingi la kredon, sed certe ĝi eblas, kaj nun, kiam mi kredas je io, mi vivas tion. Alie

tio estus tute sensenca. Dum mi vivis akorde kun la plej alta kompreno, kiun mi posedis, mi malkovris, ke alian lumon estis donita, kaj ke mi malfermis min al ricevi pluan lumon, pere de vivi la lumon, kiun mi posedis.

Tiuj leĝoj estas la samaj por ĉiuj el ni, kaj tiuj estas la aferoj, kiujn ni povas studi kaj priparoli kune. Sed estas ankaŭ tria preparo, kiu temas pri io, kio estas unika por ĉiu homa vivo, ĉar ĉiu el ni havas apartan lokon en la vivo- aranĝo. Se vi ankoraŭ ne klare scias, kie estas via loko, mi sugestas, ke vi provu serĉi ĝin en atenta silento. Mi kutimis iradi meze de la natura beleco, simple atenta kaj silenta, kaj mi ricevadis mirindan internan komprenon. Vi komencas ludi vian rolon en la vivo- aranĝo dum vi faras ĉiujn bonajn agojn, pri kiuj vi entuziasmas, eĉ se ili komence estas nur etaj bonaj agoj. Al tiuj vi donas prioritaton en via vivo super ĉiuj malseriozaj aferoj, kiuj kutime troŝarĝas la homan vivon.

Ekzistas homoj, kiuj scias kaj ne agas. Tio estas tre malĝoja. Mi memoras unu tagon, kiam mi piediris laŭ la ŝosejo, kiam bela aŭtomobilo haltis kaj la kondukanto diris al mi, "Kiel mirinde, ke vi sekvas vian vokon!" Mi respondis, "Mi certe pensas, ke ĉiu devus fari tion, kiun oni pensas ĝusta." Tiam li ekparolis al mi pri kio li sentas sin motivigita, kaj ĝi estis bona afero, kiu bezonis esti farita. Mi ekscitiĝis pro tio kaj prenis kiel garantiita, ke li farus ĝin. Mi diris, "Tio estas mirinda! Kiel vi progresas pri tio?" kaj li respondis, "Ho, mi ne faras tion. Tia laboro ne *gajnas* ion." Kaj mi neniam forgesos, kiel terure malfeliĉa estis tiu homo. Sed komprenu, en ĉi tiu materialisma epoko ni havas kriterion tiom falsan per kiu ni mezuras sukceson. Ni mezuras ĝin per dolaroj kaj materiaj aĵoj. Kaj feliĉo kaj interna paco ne troviĝas tie. Se vi scias, sed ne agas, vi estas vere tre malfeliĉa homo.

Estas ankaŭ kvara preparo, kaj ĝi estas *la simpligo de la vivo* por akordigi la internan bonstaton kun la ekstera, la psikologian bonstaton kun la materia en via vivo. Tiun mi tre facile faris. Ĵus post kiam mi dediĉis mian vivon al servico, mi sentis, ke mi ne povis pli longe akcepti *pli* ol mi bezonis dum aliaj en la mondo havas *malpli* ol ili bezonas. Tio igis min subpreni mian vivon al la

bezono- nivelon. Mi pensis, ke tio estus malfacile. Mi pensis, ke tio enhavus multe da penado, sed mi tute malpravis. Nu, dum mi nur posedas tion, per kio mi vestiĝas kaj kion mi portas en miaj poŝoj, mi ne sentas ion ajn forprenita de mi. Por mi, kion mi volas kaj kion mi bezonas ekzakte samas, kaj vi ne povus doni al mi ion ajn, kion mi ne bezonas.

Mi malkovris ĉi tiun grandan veron: nenecesaj posedaĵoj estas simple nenecesaj ŝarĝoj. Nu, mi ne intencas diri, ke ĉiuj niaj bezonoj estas samaj. Viaj estas eble multe pli grandaj ol miaj. Ekzemple, se vi havas familion, vi bezonus la stabilecon de familia centro por viaj infanoj. Sed mi ja volas diri, ke io ajn krom la bezonoj- kaj bezonoj kelkfoje inkluzivas ankaŭ aĵojn krom la fizikaj bezonoj- io ajn krom la bezono emas estiĝi ŝarĝa.

Estas granda libero en la simpleco de vivado, kaj post kiam mi eksentis tion, mi trovis harmonion en mia vivo inter interna kaj ekstera bonfarto. Estas multo, kion oni povas diri pri tia harmonio, ne nur koncerne la personan vivon, sed ankaŭ la vivon de la socio. Ĉar ni mem, kiel mondo, malproksimiĝis tiom for de la harmonio, ĉar ni tre proksimiĝis al la materia flanko, ni kapablas ĉe la malkovro de la nuklea energio, uzi ĝin kiel bombo por mortigi homojn. Tio estas ĉar nia interna bonfarto tre malantaŭiĝas de nia ekstera bonfarto. La nepra esplorado estonta estos je la *interna* flanko, je la psikologia flanko, por ke ni kapablu ekvilibri ambaŭ flankojn, por ke ni eksciu, kiel uzi bone la eksteran bonfarton, kiun ni jam posedas.

**Tiam** mi malkovris, ke estis kelkajn purigojn postulataj de mi. La unua estas tia simpla afero: ĝi estas la *purigo de la korpo*. Tio koncernas niajn fizikajn vivkutimojn. Ĉu vi manĝas prudente, manĝas por vivi? Mi efektive konas homojn, kiuj vivas por manĝi. Kaj ĉu vi scias, kiam ĉesi manĝi? Tiun aferon oni devas nepre scii. Ĉu vi havas prudentajn dormkutimojn? Mi provas enlitiĝi frue kaj havi multajn horojn da dormo. Ĉu vi ricevas multe da freŝa aero, sunbrilo, ekzercoj kaj kontakto kun la naturo? Vi kredus, ke tio estus la unua afero, pri kiu homoj klopodu, sed laŭ mia praktika

sperto mi scias, ke tio ofte estas la lasta, ĉar tiu povus postuli forlason de malbonaj kutimoj. Kaj estas nenio, al kiu ni kroĉiĝas pli tenace.

La duan purigon mi ne povas emfazi tro multe, ĉar ĝi estas *la purigo de pensoj*. Se vi konscius pri kiel fortaj estas viaj pensoj, vi neniam pensus negativan penson. Ili povas esti forta influo por la bono, kiam ili estas positivaj, kaj ili povas fari, kaj efektive faras vin korpe malsana, kiam ili estas je la negativa flanko.

Mi memoras viron, 65- jaraĝan. Kiam mi renkontis lin, li indikis simptomojn, kiuj ŝajnis kiel kronika korpa malsano. Mi parolis kun li kaj konsciis, ke estis iom da amareco en lia vivo, kvankam mi ne povis tuj trovi ĝin. Li bone akordiĝis kun sia edzino kaj plenkreskantaj infanoj, kaj li ne havis problemojn en sia komunumo, sed tamen ekzistis amareco. Mi malkovris, ke li retenis amarecon kontraŭ sia delonge mortinta patro, ĉar lia patro edukis lian fraton kaj ne lin. Kiam li kapablis rezigni tiun amarecon, la tielnomata kronika malsano komencis malaperi, kaj post nelonge ĝi estis for.

Se vi retenas la plej etan amarecon rilate al iu ajn aŭ iuj ajn malagrablajn pensojn, vi devas forigi ilin rapide. Ili neniun dolorigas, krom vi mem. Oni diras, ke malamo vundas la malamanton, ne la malamaton. Ne sufiĉas simple agi ĝuste kaj paroli ĝuste, vi ankaŭ devas pensi pri ĝustaj aferoj, por ke via vivo estu en harmonio.

La tria purigo estas la *purigo de deziroj*. Kiaj estas la aĵoj, kiujn vi deziras? Ĉu vi deziras novajn vestojn aŭ plezurojn aŭ novan hejman meblaron aŭ novan aŭtomobilon? Vi povas alveni punkton de unueco de la deziroj, koni kaj agi vian propran rolon en la vivoskemo. Pensu pri tio; ĉu ekzistas iu ajn alia, kiu vere validas deziri?

Estas unu plia purigo, kaj tio estas la *purigo de motivoj.* Kio estas via motivo por iu ajn, kiun vi farus? Se tio estas nur avido aŭ egoismo aŭ la deziro por singloro, mi dirus: *Ne faru tiun aferon*. Faru nenion, kiun vi farus per tiaj motivoj. Sed ne estas tiel facile, ĉar ni kutimas fari aferojn per tre miksitaj motivoj, bonaj kaj

malbonaj motivoj kune. Jen estas komerca viro: liaj motivoj eble ne estas la plej altaj, sed enmiksitaj kun ili estas motivoj de prizorgo por lia familio kaj eble fari iun bonan en lia komunumo. Miksitaj motivoj!

Se vi volas trovi internan pacon, via motivo devas esti eliranta motivo- ĝi devas esti servico. Ĝi devas esti doni ne ricevi. Mi konis viron, kiu estis bona arkitekto. Evidente li havis la ĝustan profesion, sed li faris ĝin per malĝusta motivo. Lia motivo estis gajni multegon da mono kaj esti antaŭ siaj gekolegoj. Li laboris tiel, ke li malsaniĝis, kaj post nelonge, mi renkontis lin. Mi igis lin fari malgrandajn aferojn por servico. Mi parolis kun li pri la ĝojo de servico kaj mi sciis, ke post kiam li spertis tion, li neniam revenus al la mem- centrita vivo. Ni korespondis iom post tio. Dum la tria jaro de mia pilgrimo, mi trairis lian urbon, kaj haltante por revidi lin, mi preskaŭ ne rekonis lin. Li estis tiel ŝanĝita homo! Sed li ankoraŭ estis arkitekto. Li ĵus desegnis planon kaj li parolis pri tio kun mi, "Rigardu, mi desegnas laŭmaniere, ke tio taŭgas por ilia ekonomio, kaj tiam mi metos ĝin sur ilia tereno, por igi ĝin aspekti bele." Lia motivo estis servi homojn, por kiuj li desegnis planojn. Li estis tiel brila kaj transformita homo. Lia edzino diris al mi, ke lia entrepreno estis pliigita, ĉar nun homoj venis el granda distanco pro domdesegnoj.

Mi renkontis kelkajn homojn, kiuj devis ŝanĝi sian laborpostenon por ŝanĝi sian vivon. Sed mi renkontis multe pli da homoj, kiuj devis ŝanĝi nur sian motivon por ŝanĝi sian vivon.

**Nun** la lasta parto. Tiu estas la rezignoj. Kiam vi estas farinta la unuan rezignon, vi estas trovinta la internan pacon, ĉar ĝi estas la *rezigno de mem- volo.* Vi povas labori je tiu per deteni vin de fari iun ajn nebonaĵon, kiun vi emus fari. Sed neniam subpremu ĝin! Se vi estas instigita diri aŭ fari malbonon, vi povas ĉiam pensi pri bona afero. Turnu intence for de tio kaj uzu la saman energion por anstataŭe fari aŭ diri bonon. Tio funkcias!

La dua rezigno estas la *rezigno de la sento de diseco.* Ni komencas senti nin disigita kaj juĝas ĉion en rilato al ni mem,

kvazaŭ ni estus la centro de universo. Eĉ intelekte scianta pli bone, ni ankoraŭ juĝas aferojn tiamaniere. En realo, kompreneble, ni ĉiuj estas ĉeloj en la korpo de la homaro. Ni ne estas disigita de niaj kunhomoj. La tuta afero estas tutaĵo. Nur de tiu pli alta vidpunkto vi povas scii, kio signifas ami vian proksimulon, kiel vin mem. De tiu pli alta vidpunkto ekzistas nur unu reala vojo al la celo: labori por la bono de ĉiuj. Kiam vi laboras por via egoista malgranda memo, vi estas simple unu ĉelo kontraŭ ĉiuj aliaj ĉeloj, kaj vi estas longe for de harmonio. Sed tuj kiam vi komencas labori por la bono de la tuteco, vi trovas vin en harmonio kun ĉiuj viaj kunhomoj. Vi vidas, tiu estas la facila, harmonia maniero vivi.

Tiam la tria rezigno, kaj tio estas *la rezigno de ĉiuj korinklinoj*. Materiaj aĵoj devas esti metitaj en sian ĝustan lokon. Ili ekzistas por esti uzataj. Estas ĝusta uzi ilin; por tio ili ekzistas. Sed kiam ili perdas sian utilon, estu preta rezigni ilin kaj eble pludoni ilin al iu, kiu bezonas ilin. Io ajn, kion vi ne povas rezigni, kiam ĝi perdis sian utilon, posedas vin, kaj en ĉi tiu materialisma epoko multaj el ni estas posedataj de posedaĵoj. Ni ne estas liberaj.

Estas alia speco de posedo. *Vi ne posedas iu ajn alian homon*, ne gravas kiel proksime parenca estas la alia kun vi. Neniu edzo posedas sian edzinon; neniu edzino posedas sian edzon; neniuj gepatroj posedas siajn infanojn. Kiam ni pensas, ke ni posedas homojn, tiam ni emas konduki ilian vivon por ili. Kaj el tio disvolviĝas ekstrema neharmonia situacio. Nur kiam ni komprenas, ke ni ne posedas ilin, ke ili devas vivi akorde kun siaj internaj motivoj, ni ĉesos provi konduki ilian vivon por ili. Kaj tiam ni malkovras, ke ni kapablos vivi kun ili en harmonio.

Nun la lasta: *la rezigno de ĉiuj negativaj sentoj.* Mi volas mencii nur unu negativan senton, kiun ankoraŭ spertas eĉ la plej agrablaj homoj, kaj tiu negativa sento estas maltrankviliĝo. Maltrankviliĝo ne estas *koncerno*, kiu instigus vin fari ĉion eblan en iu situacio. Maltrankviliĝo estas senutila cerbumo pri aferoj, kiujn ni ne povas ŝanĝi. Mi volas mencii nur unu ekzemplon. Malofte oni maltrankviliĝas pro la nuna momento; ĝi estas kutime sufiĉe en ordo. Kiam vi cerbumas, vi tormentas vin mem pro la pasinteco,

kiun vi devus esti forgesita antaŭlonge, aŭ vi antaŭtimas la estontecon, kiu ankoraŭ ne komenciĝis. Ni kutimas percepti la nuntempon nur supraĵe. Sed tio estas la sola momento, kiun oni povas vivi. Se vi ne vivas ĝin, vi neniam kapablos vere vivi. Se vi vere vivas tiun ĉi nunan momenton, vi ne maltrankviliĝos. Por mi estas ĉiu momento nova okazo por servi.

Unu lasta komento pri negativaj sentoj, kiu foje tre multe helpis min kaj helpis ankaŭ aliajn. Nenio ekstera- neniu aĵo kaj neniu homo- povas vundi min interne, psikologie. Mi rekonis, ke mi povus esti vundita psikologie sole per mia propra agadaĉo, kiun mi ja regas; per miaj propraj reagaĉoj- ili estas komplikaj, sed mi ankaŭ regas ilin; aŭ per mia propra ne- agado en iuj situacioj, kiel la nuna mondsituacio, kiu bezonas agadon de mi. Kiam mi rekonis tiun ĉi, mi sentis min tiel libera! Kaj mi tuj ĉesis vundi min mem. Nun iu povus fari la plej malican malutilon al mi, kaj mi sentus profundan kompaton por tiu neharmonia persono, tiu psikologie malsana homo, kiu kapablas fari tian aferon. Mi certe ne vundus min mem per malĝustaj reagoj kiel amareco aŭ ĉagreno. Vi povas plene regi pri tio ĉu aŭ ne vi estos psikologie vundita, kaj se vi volas, vi povas iam ajn ĉesi vundi vin mem.

Tiuj estas la paŝoj al interna paco, kiujn mi volis doni al vi. Temas pri nenio nova. Tiuj estas universala veroj. Mi nur parolis pri tiuj aferoj en miaj propraj ĉiutagaj vortoj, per terminoj de miaj personaj spertoj. La leĝoj, kiuj regas ĉi tiun universon, estigas la bonon, kiam ni obeas ilin, kaj tio, kio kontraŭas tiujn leĝojn ne longe daŭras. Tio enhavas en si mem la semojn de sia propra detruo. La bono en ĉiu homa vivo ĉiam ebligas nin obei tiujn leĝojn. Ni ja havas liberan volon pri ĉi ĉio, kaj tial dependas de ni, kiel baldaŭ ni obeas, kaj per tio trovi harmonion, interne kaj en nia mondo.

[De KPFK radio- interparolo, Los Angelo]

# RESUMO

## -- KVAR PREPAROJ --

1. *Ekhavu la ĝustan sintenon al la vivo.*
Ĉesu esti eskapanto aŭ surfaco- vivanto, ĉar tiuj sintenoj kaŭzas nur malharmonion en via vivo. Alfrontu la vivon kiel ĝi estas kaj penetru sub la ŝaŭmon de la surfaco por malkovri ĝiajn verojn kaj realojn. Solvu la problemojn, kiujn la vivo metas antaŭ vi, kaj vi trovos, ke solvi ilin, kontribuas al via interna kreskado. Helpi solvi kolektivajn problemojn ankaŭ kontribuas al via kreskado, kaj tiuj problemoj neniam estu evitataj.

2. *Vivu la bonan je kiu vi kredas.*
La leĝoj regantaj la homan konduton aplikas same rigore kiel la leĝoj de gravito. Obeemo al tiuj leĝoj puŝas nin al harmonio, malobeemo puŝas nin al malharmonio. Ĉar multaj el tiuj leĝoj jam estas komune akceptitaj, vi povas komenci per realigi ĉiujn bonajn aferojn, je kiuj vi kredas. Nenies vivo povas esti en harmonio krom se kredo kaj praktikado estas en harmonio.

3. *Trovu vian lokon en la vivo- desegno.*
Vi havas parton en la skemo de aferoj. Vi povas ekscii nur ene de vi mem, kia tiu parto estas. Vi povas serĉi tion en atenta silento. Vi povas komenci vivi akorde kun ĝi per fari ĉiujn bonajn aferojn, kiujn vi emas fari kaj doni al ili prioritaton en via vivo antaŭ ĉiuj supraĵaj aferoj, kiuj kutime okupas homan vivon.

4. *Simpligu la vivon por harmoniigi internan kaj eksteran bonfarton.*
Nenecesaj posedaĵoj estas nenecesaj ŝarĝoj. Multaj vivoj estas plenigataj ne nur per nenecesaj aĵoj, sed ankaŭ per sensenca faroj. Tro ŝarĝita vivo estas malharmonia vivo kaj postulas simpligon. Deziroj kaj bezonoj povas iĝi similaj en la homa vivo. Kiam tio estas atingita, tiam estiĝos sento de harmonio inter interna kaj ekstera bonfarto. Tia harmonio estas bezonata ne sole en la persona

vivo, sed ankaŭ en la kolektiva vivo.

## -- KVAR PURIGOJ --

1. *Purigo de la korpa templo.*
Ĉu vi ne havas malbonajn kutimojn? Ĉu vi emfazas en via nutrado la esencajn nutraĵojn- la fruktojn, tutgrajnojn, legomojn kaj nuksojn? Ĉu vi enlitiĝas frue kaj ricevas sufiĉajn dormhorojn? Ĉu vi ricevas multe da freŝa aero, sunbrilo, ekzercoj kaj naturkontakto? Se vi povas respondi al ĉiuj tiuj demandoj per "jes, ja", vi jam iris longan vojon al purigo de la korpa templo.

2. *Purigo de pensoj.*
Ne sufiĉas fari ĝustajn aferojn. Vi devas ankaŭ pensi pri la ĝustajn aferojn. Pozitivaj pensoj povas esti forta influo por la bono. Negativaj pensoj povas fari vin korpe malsana. Certigu, ke ne estas iu senpaca situacio inter vi kaj iu ajn homo, ĉar nur kiam vi ĉesas havi malagrablajn pensojn, tiam vi povas akiri internan harmonion.

3. *Purigo de deziroj.*
Ĉar vi estas ĉi tie, ke vi harmoniu kun la leĝoj, kiuj regas la homan konduton, kaj kun via parto en la skemo de aferoj, viaj deziroj estu kondukataj al tiu direkto.

4. *Purigo de motivoj.*
Evidente viaj motivoj neniam estu avido aŭ sincelo, aŭ la deziro por mem- glorifikado. Vi eĉ ne havu la egoisman motivon por atingi internan pacon por vi mem. Esti servema al viaj kunhomoj devas esti via motivo, antaŭ ol via vivo povas harmoniĝi.

## -- KVAR REZIGNOJ --

1. *Rezigno de mem- volo.*
Vi havas, aŭ ŝajnas kvazaŭ vi havus, du memojn: la malsupran memon, kiu kutime regas vin memcentre, kaj la pli altan, kiu pretstaras por glore uzi vin. Vi devas subordigi la malsupran

memon per deteni vin de fari la nebonajn aferojn, kiujn vi emas fari; ne subpremanta ilin, sed transformanta ilin tiel, ke la pli alta memo povu regi vian vivon.

2. *Rezigno de la sento de diseco.*
Ni ĉiuj tutmonde estas ĉeloj en la korpo de la homaro. Vi ne estas disigita de viaj kunhomoj, kaj vi ne povas trovi harmonion nur por vi mem. Vi sole povas trovi harmonion kun viaj kunhomoj, kiam vi rekonas la unuecon de ĉio, kaj laboras por la bono de ĉiuj.

3. *Rezigno de ligitecoj.*
Nur post rezigno de ĉiuj dependoj vi povas esti vere libera. Materiaj aĵoj estas ĉi tie por ke ili estu uzataj, kaj iu ajn, kiun vi ne povas rezigni, kiam ĝi ne plu taŭgas, posedas vin. Vi nur povas vivi en harmonio kun viaj kunhomoj, se vi havas nenian senton, ke vi posedas ilin, kaj tial ne provas regi iliajn vivojn.

4. *Rezigno de ĉiuj negativaj sentoj.*
Klopodu por rezigni negativajn sentojn. Se vi vivas en la nuna momento, kiu ja estas la nura momento, kiun vi posedas por vivi, vi estos malpli zorgaĉema. Se vi komprenas, ke la homoj, kiuj faras malbonaĵojn estas psike malsanaj, viaj sentoj de ĉagreno ŝanĝos al sentoj de kompato. Se vi rekonas, ke ĉiuj viaj internaj vundoj estas kaŭzitaj de viaj propraj malĝustaj reagoj aŭ neago, vi ĉesos vundi vin mem.

## PENSOJ

* Ni ĉiuj povas uzi nian tempon por fari bonaĵojn. Ĉiam, kiam vi renkontas homon, pensu pri io kuraĝiga, kiun vi povas diri- agrablan vorton, helpeman sugeston, esprimon de admiro. Ĉiam, kiam vi venas en iun situacion, pensu pri ia bonaĵo, kiun vi povas alporti- penseman donacon, konsidereman sintenon, helpeman manon.
* Estas kriterio per kiu vi povas juĝi, ĉu viaj pensoj kaj aferoj

faritaj de vi estas ĝustaj por vi. Tio kriterio estas: *Ĉu ili donis al vi internan pacon?* Se ne, tiam ili estas iel malĝustaj- do kontinuu provi.

* Se vi sufiĉe amas homojn, ili respondos amante. Se mi ofendas homojn, mi kulpigas min mem, ĉar mi scias, ke se mia konduto estus ĝentila, ili ne estus ofenditaj, eĉ se ili ne konsentas kun mi. "Antaŭ ol la lango povas paroli, ĝia vundpovo devas esti perdita".

* Por homo, kiu sentas sin deprmita, mi dirus: Provu plenigi vian ĉirkaŭon je belega musiko kaj floroj. Provu legi kaj memorigi pensojn inspirajn. Provu fari liston de ĉiuj aferoj pri kiuj vi devas esti dankema. Se estas iu bona afero, kiu vi jam ĉiam volis fari, komencu fari tion. Faru konsiderindan planon por vi mem kaj sekvu ĝin.

* Kvankam aliaj eble kompatas vin, neniam kompatu vin mem- tio mortigas la spiritan bonfarton. Rekonu ĉiujn problemojn, eĉ la malfacilajn, kiel okazon por spirita kreskado, kaj uzu ĝin plej bone.

* De ĉiuj aferoj, pri kiu vi legas kaj de ĉiuj homoj, kiujn vi renkontas, prenu la bonan- tion, pri kiu via propra "Interna Instruisto" diras, ke ĝi estas por vi- kaj lasu la reston. Por gvidado kaj por vero estas pli bone, rigardi al la fonto per via "Interna Instruisto" ol rigardi al homoj aŭ libroj. Libroj kaj homoj povas nur instigi vin. Krom se ili vekas ion en vi, nenia valora estas atingita.

* Neniu estas vere libera, kiu ankoraŭ estas alfiksita al materiaj aĵoj aŭ lokoj aŭ homoj. Ni devas esti kapabla uzi aĵojn, kiam ni bezonas ilin kaj tiam senbedaŭre rezigni ilin, kiam ili ne plu taŭgas. Ni devas esti kapabla estimi kaj ĝui la lokojn, kie ni restas, kaj tamen senangore pluiri, kiam ni estas vokita ien ajn. Ni devas esti kapabla vivi en amanta ligo kun homoj, sen sentoj ke ni posedas ilin kaj devas regi ilian vivon. Io ajn, kion vi klopodas por teni, firmtenos vin, kaj se vi volas liberecon, vi devas doni liberecon.

* La spirita vivo estas la vera vivo- ĉio alia estas ilusio kaj decepto. Nur tiuj, kiuj estas sole alfiksitaj al Dio estas vere liberaj. Nur tiuj, kiuj vivas laŭ sia plej alta lumo trovas sian vivon en harmonio. Tiuj, kiuj agas laŭ siaj plej altaj motivoj estiĝas forto por la bono. Ne gravas, ĉu aliaj estas senteble influataj. Rezultoj neniam estu

serĉataj, nek dezirataj. Sciu, ke ĉiu ĝusta afero, kiun vi faras- ĉiu bona vorto, kiun vi diras- ĉiu pozitiva penso, kiun vi pensas- havas bonan efikon.
* Ĉiuj homoj povas esti laborantoj por paco. Kiam ajn vi alportas harmonion en nepacan situacion, vi kontribuas al la tuta paco-bildo. Tiom vi havas pacon en via vivo, kiom vi reflektas ĝin en vian ĉirkaŭon kaj en la mondon.
* Tio, kion oni ricevas de ekstere, povas esti komparata kun scio. Ĝi gvidas al kredo, kiu estas malofte sufiĉe forta por motivi agadon. Tio, kio estas konfirmita *de interne,* post kiam ĝi estas kontaktita de ekstere, aŭ tio, kio estas rekte perceptita *de interne* (kiu estas mia vojo), povas esti komparita kun saĝo. Tio gvidas al *scio,* kaj rekte ĝin sekvas agado.
* En nia spirita evoluo ni ofte devas eltiri radikojn kaj fermi multajn ĉapitrojn en nia vivo ĝis ni ne plu kroĉiĝas al materiaj aĵoj kaj povas ami ĉiujn homojn sen ia alligo al ili.
* Vi ne povas forlasi situacion sen spirita vundiĝo, krom se vi forlasas ĝin amante.
* Se vi volas instrui homojn, junajn aŭ maljunajn, vi devas komenci kie ili troviĝas- ĉe ilia nivelo de kompreno. Se vi vidas, ke ili jam paŝis preter via nivelo de kompreno, lasu ilin instrui vin. Ĉar paŝoj al spirita progreso estas prenitaj en tia varia ordo, plej multaj el ni povas instrui unu la alian.
* Fizika perforto povas finiĝi, eĉ antaŭ ol ni lernas la vojon de amo, sed mensa perforto daŭros ĝis ni lernas ĝin. Per leĝoj nur ekstera paco povas esti akirita. Interna paco estiĝas per amo.
* Koncentriĝu je doni, tiel ke vi malfermu vin por ricevi. Koncentriĝu je vivi akorde kun la lumo, kiun vi havas, tiel ke vi malfermu vin por ricevi pli da lumo.
* Kelkfoje aperas korpaj malfacilaĵoj por montri al vi, ke la korpo simple estas nur sendaŭra vestaĵo- ke la realo estas la nedetruebla esenco, kiu aktivigas la korpon.
* Post kiam vi trovis internan pacon, spirita kreskado harmonie okazas, ĉar vi- nun gvidata de la pli alta memo- faras tion, kion Dio volas de vi, kaj vi ne plu bezonas esti puŝita al tio.

* Nenio minacas tiujn, kiuj faras la volon de Dio, kaj la volo de Dio estas amo kaj kredo. Tiuj, kiuj sentas timon kaj malamon ne estas en harmonio kun la volo de Dio kaj eble ekhavos malfacilaĵojn.
* Ĉiuj malfacilaĵoj en via vivo havas utilon. Ili puŝas vin al harmonio kun la volo de Dio.
* Ekzistas *ĉiam* vojo por fari la ĝustan!
* Tio kion ni suferadas estas *malmatureco*. Se ni estus maturaj homoj, milito ne estus problemo- ĝi ne eblus.
* Kompreneble mi fidas je la leĝo de amo! Ĉar la universo funkcias laŭ la leĝo de amo, kiel mi povus fidi je io ajn alia?
* Por la lumo, mi rekte iras al la fonto de lumo, ne al iuj reflektaĵoj de ĝi. Mi ankaŭ ebligas min ricevi pli da lumo per tio, ke mi akordas kun la plej alta lumo, kiun mi posedas. Vi ne povas miskompreni la lumon venantan de la fonto, ĉar ĝi venas kun *plena kompreno*, tiel ke vi povas ekspliki kaj pridiskuti ĝin.
* Juĝi aliajn gajnos por vi nenion kaj vundos vin mense. Nur se vi povas instigi aliajn juĝi sin mem, iu inda estas plenumita.
* Neniam pensu pri iu ĝusta klopodo kiel vana- ĉiu ĝusta klopodo alportas bonan rezulton, ĉu vi vidas ĝin aŭ ne. Simple koncentriĝu je pensi kaj vivi kaj agi por paco, kaj instigi aliajn, ke ili same faru, lasante la rezultojn en la mano de Dio.
* Vi ne povas ŝanĝi iun ajn, krom vi mem. Post kiam vi estiĝas ekzemplo, vi povas instigi aliajn ŝanĝi sin mem.
* En konflikta situacio vi devas pensi pri solvo, kiu estas justa por ĉiuj koncernataj, anstataŭ pri solvo, kiu estas sole avantaĝo por vi mem. Nur solvo, kiu estas justa por ĉiuj povas daŭre funkcii.
* Viaj motivoj devus esti bonaj, se via klopodo havu bonajn efikojn.

## DE MIA KORESPONDADO

Demando: Ĉu vi laboras por vivteni vin?
Respondo: Mi laboras por mia vivteno per nekutima maniero. Mi

donas tion, kion mi povas, per pensoj kaj vortoj kaj agoj al tiuj, kies vivon mi tuŝas kaj al la homaro. Rekompense mi akceptas tion, kion homoj volonte donas, sed mi ne demandas pri tio. Ili estas benataj per ilia donado, kaj mi estas benata per mia donado.

D: Kial vi ne akceptas monon?
R: Ĉar mi parolas pri spirita vero, kaj spirita vero neniam devas esti vendita- tiuj, kiuj vendas ĝin vundas sin spirite. La monon, kiu alvenas poŝte- sen peto- mi ne uzas por mi mem; mi uzas ĝin por presado kaj por poŝtado. Tiuj, kiuj provas aĉeti spiritan veron, provas akiri ĝin antaŭ ol ili estas preta. En tiu ĉi mirinde bonordigita universo ĝi estos donita, kiam ili estas preta.

D: Ĉu vi ne estiĝas soleca aŭ malkuraĝa aŭ laca?
R: Ne, kiam vi vivas en daŭra komunikado kun Dio, vi ne povas esti soleca. Kiam vi perceptas la funkciadon de la mirinda plano de Dio kaj scias, ke ĉiu bona klopodo alportas bonajn fruktojn, vi ne povas esti malkuraĝa. Kiam vi estas trovinta internan pacon, vi estas en kontakto kun la fonto de universa energio, kaj vi ne povas esti laca.

D: Kio signifas emeriteco por homo?
R: Emeriteco signifu ne la fino de agoj, sed ŝanĝo de agoj kun pli plena donado de via vivo al servo. Tial ĝi estus la plej mirinda tempo de via vivo- la tempo, kiam vi estas ĝoje kaj sencoplene okupita.

D: Kiel mi povas senti min proksime al Dio?
R: Dio estas amo, kaj kiam ajn vi agas per amanta komplezo, vi esprimas Dion. Dio estas vero, kaj kiam ajn vi serĉas veron, vi estas serĉanta Dion. Dio estas beleco, kaj kiam ajn vi estas tuŝata de la beleco de floro aŭ de sunsubiro vi tuŝas Dion. Dio estas la inteligento, kiu kreas ĉion kaj subtenas ĉion kaj kunligas ĉion kaj donas vivon al ĉio. Jes, Dio estas la esenco de ĉio. Do vi estas ene de Dio, kaj Dio estas ene de vi- vi ne povas esti, kie Dio ne estas. Ĉion penetras la leĝo de Dio- fizika leĝo kaj spirita leĝo. Malobeu

tion kaj vi sentos malfeliĉon- vi sentos vin apartigita de Dio. Obeu tion kaj vi sentos harmonion- vi sentos vin proksime al Dio.

D: Kiaj estas la bonaj aferoj kaj kiel mi plenigas mian vivon per ili?
R: Bonaĵoj helpas vin kaj aliajn. Vi eble ricevas iom da inspiron de ekstere, sed en la fina analizo vi devas scii de interne per kiajn aferojn vi volas plenigi vian vivon. Tiam vi povas fari planon laŭ viaj ideoj pri la bona vivo kaj vivi laŭplane. Tio povas inkludi ion bonan por la korpo- kiel ekzercoj aŭ promenado. Aŭ ion instigan por la intelekto- kiel senca legado. Kaj ion kuraĝigan por la emocioj- kiel bona muziko. Sed plej grava el ĉio, tio devas inkludi servon al aliaj, se vi gajnus spiritan profiton de tio.

D: Se mi alfrontas problemon, ĉu mi povas fari ion pri ĝi intelekte?
R: Se tio estas sana prolemo, demandu vin, "Ĉu mi misuzis mian korpon?" Se tio estas mensa problemo, demandu vin, "Ĉu mi estis tiel amanta, kiel Dio volus, ke mi estu?" Se tio estas financa problemo, demandu vin, "Ĉu mi vivis laŭsalajre?" Kion vi faras nuntempe, tio kreas la estontecon, do uzu la nuntempon por krei mirindan estontecon. Per viaj pensoj vi konstante kreas viajn internajn kondiĉojn kaj partoprenas en la kreado de la kondiĉoj ĉirkaŭ vi. Do tenu viajn pensojn je la pozitiva flanko, pensu pri la plej bona, kiu povus okazi, pensu pri la plej bonaj aferoj, de kiuj vi volas, ke ili okazu- pensu pri Dio!

D: Kiel mi komencas vere vivi la vivon?
R: Mi komencis vere vivi la vivon, kiam mi komencis rigardi al ĉiu situacio kaj pripensis, kiel mi povus servi en tiu situacio. Mi komprenis, ke mi ne estu trudema pri tio, sed simple volema. Ofte mi povis doni helpeman manon- aŭ eble aman rideton aŭ kuraĝigan vorton. Mi komprenis, ke oni gajnas la indajn aferojn en la vivo per doni.

D: Kiel trovas ordinara edzino kaj patrino tion, kion vi ŝajne posedas?

R: Tiu, kiu prizorgas familion (kiel faras la plej multo da homoj) trovas internan pacon samvoje kiel mi trovis ĝin. Obeu la leĝojn de Dio, kiuj estas la samaj por ĉiuj- ne nur la fizikajn, sed ankaŭ la spiritajn leĝojn, kiuj regas la homan konduton. Vi eble komencas per vivi ĉiujn bonajn aferojn, je kiuj vi kredas, kiel mi faris. Trovu vian apartan lokon en la dia skemo, kiu estas unika por ĉiu homa animo, kaj adaptiĝu al ĝi. Vi eble provu serĉi en atenta kvieteco, kiel mi faris. Troviĝi en familia skemo ne estas obstaklo al spirita kreskado, kaj kelkfoje tio estas avantaĝo. Ni kreskas per solvi problemojn, kaj zorgi pri familio enhavas multajn problemojn por kreskado. Kiam ni eniras familian situacion, ni spertas nian unuan eliron el memcentrita al familiacentrita vivo. Efektiva amo estas preteco doni sen iu penso pri rericevi iun ajn, kaj la familia skemo donas la unuan sperton pri vera amo- la patrina kaj patra amo por ilia bebo.

D: Ĉu estos ĉiam sufero, kiam oni estiĝas pli belkora?
R: Estos suferado en via spirita kreskado ĝis vi pretas fari la dian volon kaj ne plu bezonas esti puŝita al tio. Kiam vi ne harmonias kun la volo de Dio, problemoj alvenos. Iliaj celo estas devigi vin harmoniiĝi. Se vi voleme farus la volon de Dio, vi povus eviti la problemojn.

D: Ĉu mi iam ajn eniros staton de trankvilo sen plua bezono estiĝi?
R: Kiam vi trovas internan pacon, vi ne plu sentas bezonon estiĝi- vi estas kontenta pri *esti,* kiu inkludas sekvi vian dian gvidadon. Tamen vi ankoraŭ kreskas- sed harmonie.

D: Kio estas vere religia persono?
R: Mi dirus, ke vere religia persono havas religiajn sintenojn: aman sintenon al siaj kunhomoj, obeeman sintenon al Dio, al la leĝoj kaj gvidado de Dio, kaj religian sintenon al si mem- sciante, ke oni estas pli ol la memcentrita naturo, pli ol la korpo, kaj ke la vivo estas pli ol la vivo sur la tero.

D: Kio venkas timon?

R: Mi dirus, ke religia sinteno venkas timon. Se vi posedas aman sintenon al via kunhomoj, vi ne timos ilin. *"Perfekta amo elĵetas timon."* Obeema sinteno al Dio igas vin daŭre konscia pri la ĉeesto de Dio, kaj tiam timo estas malaperinta. Kiam vi scias, ke vi nur portas la korpon, kiu povas esti detruita, ke *vi* estas *la realo*, kiu *aktivigas* la korpon kaj ne povas esti detruita. Do kiel vi povas senti timon?

## PROGRESO DE PACO PILGRIMULO

Eltiraĵoj de la novaĵbultenoj

**Kvar leteroj:** Unu tagon, kiam mi estis respondantaj miajn leterojn, iu virino diris al mi, "Kion homoj povas fari por la paco?" Mi respondis, "Lasu min vidi, kion tiuj leteroj diras." La unua diris, "Mi estas biena dommastrino. Post kiam mi parolis kun vi, mi komprenis, ke mi devu fari ion por paco- aparte, ĉar mi prizorgas kvar filojn. Nun mi skribas unu leteron ĉiutage al iu en nia registaro aŭ en la Unuiĝintaj Nacioj, kiu faris ion por la paco, laŭdante ilin por doni al ili moralan subtenon." La sekvanta letero diris, "Monda paco ŝajnas iom tro granda al mi, sed post kiam mi parolis kun vi, mi membriĝis je la Konslio de Homaj Rilatoj en mia urbo, kaj mi laboras por paco inter grupoj." La tria diris, "Post kiam mi parolis kun vi, mi solvis nepacan situacion inter mi kaj mia bofratino." La lasta diris, "Post kiam mi parolis kun vi, mi ĉesis fumi." Kiam vi faras ion por la monda paco, paco inter grupoj, paco inter individuoj, aŭ por via propra interna paco, *vi plibonigas la tutan pacan bildon.* Kiam ajn vi alportas harmonion en iun ajn nepacan situacion, vi kontribuas ion al la paco.

**La plej indaj aferoj:** Post mirinda ekskurso en la sovaĝejo, mi denove marŝas laŭstrate en urbo, kiu estis dumtempe mia hejmo. Estas tagmeze. Centoj da nete vestitaj homoj kun palaj aŭ ŝminkitaj vizaĝoj rapidas en sufiĉe bonordaj linioj al iliaj laborlokoj aŭ reen. Mi, en miaj velkintaj vestaĵoj kaj bonuzitaj ŝuoj,

marŝas inter ili. Miaj kaŭĉukaj plandumoj moviĝas senbrue apud la klakoj de mallarĝaj ŝikaj ŝuoj kun altaj kalkanumoj. En la pli malriĉaj najbarejoj mi estas tolerita. En la pli riĉaj najbarejoj kelkaj rigardoj ŝajnas iom perpleksaj kaj aliaj malestimaj. Ambaŭflanke de ni estas ekspoziciataj la aĵojn, kiujn ni povas aĉeti, se ni pretas stari en bonordaj linioj, tagon post tago, jaron post jaro. Kelkaj de la aĵoj estas pli malpli utilaj, multaj estas tute ruba- iuj posedas belecon, multaj estas evidente tre malbelaj. Miloj da aĵoj estas ekspoziciataj- kaj tamen mankas la plej indaj aferoj. Libereco ne estas ekspoziciata, nek sano, nek feliĉo, nek mensa paco. Por akiri tiujn, miaj amikoj, ankaŭ vi eble bezonas eskapi el la bonordaj linioj kaj riski esti regardata kun malestimo.

**Negativa kontraŭ pozitiva:** Mi elektis la pozitivan aliron- anstataŭ emfazi la negativajn aferojn, kiujn mi ne ŝatas, mi emfazas la pozitivajn aferojn, kiujn mi favoras. Tiuj, kiuj elektas la negativan eliron, koncentriĝas sur tio, kio estas malĝusta, kutime juĝas kaj kritikas, kaj kelkfoje eĉ nomaĉvokas. Kompreneble la negativa aliro havas malutilan efikon sur persono, kiu uzas ĝin, dum la pozitiva aliro havas bonan efikon. Kiam malico estas atakita, ĝi mobilizas sin, kvankam antaŭe eble ĝi estis malforta kaj ne organizita, kaj tial la atako donas al ĝi validon kaj forton. Kiam estas neniu atako, sed anstataŭ bonaj influoj estas alportataj al la situacio, la malicaĵo ne nur inklinas malaperi, sed la maliculo ankaŭ inklinas esti konvertita. La pozitiva aliro inspiras- la negativa aliro ĉagrenas. Kiam vi ĉagrenas homojn, ili respondas akorde al siaj bazaj instinktoj, ofte perforte kaj senracie. Kiam vi inspiras homojn, ili agas akorde al siaj pli altaj instinktoj, prudente kaj racie. Ĉagreno mallonge daŭras, dum inspiro kelkfoje havas tutvivan efikon.

**Labori por paco:** Malmultaj vere dediĉitaj homoj povas kompensi la malbonan efikon, kaŭzita de amaso da neharmoniaj homoj. Do ni, kiuj laboras por paco, ne ŝanceliĝu. Ni devas plue preĝi por paco kaj agadi por paco per kia ajn manieron. Ni devas plue paroli

por paco kaj vivi la vojon de paco. Por inspiri aliajn, ni devas plue pensi pri paco kaj scii, ke ĝi estas ebla. Pri kio ni koncentriĝas, tion ni ebligas realigi. Unu malgranda homo, kiu dediĉas sian tutan tempon por paco, faras novaĵojn. Multaj homoj, donantaj iom de ilia tempo, povas fari historion.

BENATAJ estas tiuj, kiuj donas sen atendi eĉ dankon pro tio, ĉar ili estos abunde rekompencitaj.

BENATAJ estas tiuj, kiuj realigas ĉiujn bonajn aferojn, konataj al ili, ĉar ili spertos eĉ pli altajn verojn.

BENATAJ estas tiuj, kiuj plenumas la dian volon, sen demandi rezultojn videblajn, ĉar ili estos grande rekompencitaj.

BENATAJ estas tiuj, kiuj amas kaj fidas siajn kunhomojn, ĉar ili atingos la bonan en homoj kaj ricevos amantan respondon.

BENATAJ estas tiuj, kiuj rekonis la realon, ĉar ili scias, ke ne la argila kostumo, sed tio, kiu aktivigas ĝin estas reala kaj ne detruebla.

BENATAJ estas tiuj, kiuj rekonas, ke la ŝanĝo, kiun ni nomas morto, estas liberiĝo de la limoj de nia tervivo, ĉar ili ĝojos kun siaj amatoj, kiuj faras la gloran transiron.

BENATAJ estas tiuj, kiuj post ili dediĉis sian vivon, kaj per tio ricevis benon, havas sufiĉan kuraĝon kaj kredon por venki malfacilaĵojn sur la vojo antaŭen, ĉar ili ricevos duan benon.

BENATAJ estas tiuj, kiuj progresas sur la spirita vojo sen memcentra motivo de serĉado por interna paco, ĉar ili trovos ĝin.

BENATAJ estas tiuj, kiuj anstataŭ provi rompi la pordegojn de ĉiela regno, modeste proksimiĝas al ili humilaj, amantaj kaj purigitaj, ĉar ili rekte trairos.

**Vi povas koni Dion:** Ekzistas povo pli granda ol ni mem, kiu

realigas sin interne de ni, kiel ankaŭ ĉie en la universo. Tion mi nomas Dio. Do ĉu vi scias, kio estas tio, koni Dion- havante daŭran gvidadon dian- daŭran konscion pri la ĉeesto de Dio? Koni Dion signifas reflekti amon al ĉiuj homoj kaj al ĉiuj kreaĵoj. Koni Dion signifas senti pacon interne- trankvilon, serenon neskueblecon, kiu ebligas vin konfronti ajnan situacion. Koni Dion signifas esti plenigita per ĝojo, tiel ke ĝi elfluas kaj pluiras ĉirkaŭen por beni la mondon. Restas nun nur unu deziro por mi- plenumi la volon de Dio- ne estas konflikto. Kiam Dio gvidas min marŝi pilgrimon, mi ĝoje faras tion. Kiam Dio gvidas min fari aliajn aferojn, mi faras tion same ĝoje. Se mia agado estas kritikata, mi prenas tion sen klini mian kapon. Se mi estas laŭdata pro ĝi, mi tuj transdonas tion al Dio, ĉar mi ja estas nur la malgranda instrumento, per kiu Dio faras la laboron. Kiam Dio gvidas min fari ion, tiam al mi estas donita forto kaj provizo, al mi estas montrita la vojo kaj donitaj la ĝustaj vortoj por paroli. Ĉu la vojo estas facila aŭ malfacila, mi iradas en la lumo de dia amo, paco kaj ĝojo, kaj mi turnas min al Dio per psalmoj de dankemo kaj laŭdo. Tio estas rekoni Dion. Kaj la rekono de Dio ne estas rezervita por la granduloj. Estas por malgranduloj kiel vi kaj mi. Dio ĉiam estas serĉanta vin- ĉiun el vi. Vi povas trovi Dion, se vi volas. Nur serĉu- per obei diajn leĝojn, per ami homojn, per rezigni la memvolon, alfikson, negativajn pensojn kaj sentojn. Kaj kiam vi trovas Dion, tio okazos en kvieteco. Vi trovos Dion interne de vi.

**Pri timo:** Estas neniu pli granda barilo al monda paco aŭ interna paco ol timo. Ni inklinas akiri neracian malamon kontraŭ tio, kion ni timas. Tiel fine ni timas kaj malamas. Tio vundas nin ne nur psikologie kaj pligrandigas la streĉiteco de la mondo, sed per tia negativa koncentriĝo ni emas altiri la aferojn, kiujn ni timas. Se ni nenion timas kaj radias amon, ni povas atendi ke bonaj aferoj venos. Kiom multe la mondo bezonas la mesaĝon kaj ekzemplon de amo kaj kredo!

**La libereco de simpleco:** Kelkaj ŝajnas pensi, ke mia vivo

dediĉata al simpleco kaj servo estas aŭstera kaj senĝoja, sed tiaj personoj ne konas la liberecon de simpleco. Mi sufiĉe scias pri nutraĵo por zorge nutri mian korpon, kaj mi posedas bonegan sanon. Mi ĝuas manĝaĵon, sed mi manĝas por vivi. Mi ne vivas por manĝi kaj mi scias, kiam ĉesi manĝi. Mi ne estas sklavo de nutraĵo. Miaj vestoj estas plej komfortaj kaj ankaŭ plej praktikaj. Miaj ŝuoj, ekzemple, havas molan teksan supraĵon kaj kaŭĉuksimilajn plandumojn- mi sentas min libera, kvazaŭ mi irus senŝue. Mi ne estas sklavo de modo. Mi ne estas sklavo de komforto kaj oportuneco. Por ekzemple, mi same bone dormas en mola lito kiel sur la herbo apud la strato. Mi ne estas ŝarĝita per nenesecaj posedaĵoj aŭ sensencaj agoj. Mia vivo estas plena kaj bona, sed ne tro plena, kaj mi faras mian laboron facile kaj ĝoje. Mi sentas belecon ĉie ĉirkaŭ mi, kaj vidas belecon en ĉiu, kiun mi renkontas, ĉar mi vidas Dion en ĉio. Mi rekonas la leĝojn, kiuj regas la universon, kaj mi trovas harmonion per ĝoje kaj gaje obei ilin. Mi rekonas mian rolon en la vivoskemo, kaj trovas harmonion per ĝoje kaj gaje vivi ĝin. Mi rekonas mian unuecon kun la tuta homaro kaj kun Dio. Mia feliĉo superfluas dum mi amas kaj donas al ĉiuj kaj ĉion.

**Pri homoj en nia tempo:** Por helpi enkonduki la Oran Epokon, ni devas vidi la bonan en la homoj, ni devas scii, ke ĝi estas tie, ne gravas kiom profunde ĝi estas enterigita. Jes, apatio ekzistas kaj egoismo, sed tamen ankaŭ la bono. Ne per racio la bono povas esti atingita, sed per amo kaj kredo. Amo povas savi la mondon de nuklea detruo. Amu Dion, turnu vin al Dio kun akcepto kaj respondo. Amu viajn kunhomojn, turnu vin al ili kun amikeco kaj donacemo. Fari vin merita de la nomo Infano de Dio, per ke vi vivu la vojon de amo.

**Spirita kreskado:** Tio estas proceso same kiel fizika kreskado aŭ mensa. Kvinjaraj infanoj ne supozas esti samaltaj kiel siaj gepatroj je ilia venontan naskiĝtagon; la unuagrada lernanto ne supozas eniri universitaton je fino de la lernejojaro; la studento de la vero

ne atendus akiri internan pacon tranokte.

**Magiaj formuloj:** Ekzistas magia formulo por solvi konfliktojn. Jen: *Celu la solvon de konflikto, ne la gajnon de iu avantaĝo*. Ekzistas magia formulo por eviti konfliktojn. Jen: *Koncernu, ke vi ne ofendu, ne ke vi ne estas ofendita.*

**Pri senmatureco:** De kio homoj vere suferas estas nematureco. Inter maturaj homoj milito ne estus problemo- ĝi ne eblus. En sia senmatureco homoj volas samtempe pacon kaj la aferojn, kiuj faras militon. Tamen homoj povas maturiĝi ĝuste kiel infanoj kreskas. Jes, niaj institucioj kaj gvidantoj spegulas nian senmaturecon, sed kiam ni maturiĝas, ni elektos pli bonajn gvidantojn kaj starigos pli taŭgajn instituciojn. Ĉiam tio temas pri la afero, kiun multaj el ni deziras eviti- klopodi pro plibonigi nin mem!

**Mia mesaĝo:** Miaj amikoj, la monda situacio estas serioza. La homaro per timeme hezitaj paŝoj moviĝas sur tranĉila klingo inter tuta kaoso kaj Ora Epoko, dum fortaj povoj puŝas nin al kaoso. Krom se ni, la homoj de la mondo, vekiĝas de nia letargio kaj firme kaj rapide puŝas for de la kaoso, ĉio, kion ni amas estos detruita en la holokaŭsto, kiu trafos nin ĉiuj.
Jen la vojo de paco: venku malbonon per bono, malveron per vero, kaj malamon per amo.
La Ora Regulo same efikus. Bonvolu ne simple diru, ke tio simple estas religiaj konceptoj kaj ne praktikeblaj. Tiuj estas leĝoj, kiuj regas la homan konduton same severe, kiel la leĝo de la graviteco. Kiam ni malagnoskas tiujn leĝojn en iu ajn vivkampo, kaoso rezultos. Per obeo je tiuj leĝoj nia timema militlaca mondo povas eniri periodon de paco kaj riĉeco de vivo preter niaj plej amataj revoj.

**Baznivela- pacoagado:** Vi povas fondi komunuman porpaca grupon per porpaca preĝogrupo por serĉi la vojon de paco. En iuj lokoj mia skribaĵo estis uzata, ĉar ĝi temas pri paco de la spirita

vidpunkto. Legu paragrafon, pripensu ĝin dum silenta atento, tiam parolu pri tio. Ĉiu, kiu povas kompreni kaj senti la spiritajn verojn en ĝi, estas spirite preta labori por paco.

Tiam venus porpaca studgrupon. Ni devas havi klaran bildon pri la nuna mondsituacio kaj pri tio, kio estos bezonata por transformi ĝin al paca mondsituacio. Certe ĉiuj nunaj militoj devas ĉesi. Kompreneble ni devas trovi vojon por kune demeti niajn armilojn. Ni devas instali perilojn por eviti fizikan perforton en mondo, kie ankoraŭ ekzistas psikologia perforto. Ĉiuj nacioj devas fordoni unu rajton al la Unuiĝintaj Nacioj- la rajton fari militon.

Ni homoj de la mondo devas lerni meti la bonfarton de la tuta homaro super la bonfarto de iu ajn grupo. Malsatmorto kaj suferado devas esti forigitaj, same kiel timo kaj malamo. Ekzistas kelkaj naciaj problemoj ligitaj kun paco. Oni devas labori por intergrupa paco. Nia plej grava nacia problemo estas la adaptiĝo de nia ekonomio al pacatempa situacio. Ni bezonas Departementon de Paco en nia nacia registaro por fari vastan esploron pri pacaj vojoj por solvi konfliktojn. Tiam ni povas demandi, ke aliaj landoj kreu similajn departamentojn.

Kiam vi komprenas la mondajn problemojn kaj la paŝojn por ilia solvo, vi estas preta estiĝi Porpaca Agadogrupo. Vi povas estiĝi Porpaca Agadogrupo iom post iom- agu je iu problemo, kiun vi jam komprenas. Porpaca agado ĉiam okazu en formo, ke vi vivu la vojon de paco. Tio povas ankaŭ havi la formon de leterverkado- por laŭdi tiujn, kiuj faris ion bonan por la paco, al membroj de kongreso pri porpaca leĝokreado, al eldonistoj pri pacaj aferoj, al amikoj pri tio, kion vi lernis pri paco. Tio ankaŭ povas havi la formon de publikaj kunvenoj pri pacaj aferoj, parolantoj pri pacaj aferoj, distribui pacan literaturon, paroli al homoj pri paco, paca semajno, paca foiro, paca irado aŭ paca paradaŭto. Tio povas havi la formon de elekti tiujn, kiuj dediĉas sin al la vojo de paco.

Baznivela pacolaboro havas esencan gravecon. En tiu ĉi kriza periodo devus ekzisti Komunuma Paca Kunularo en ĉiu urbo. Tia grupo povas komenciĝi kun manpleno da koncernitaj homoj. Ĝi povas komenciĝi kun vi!

Se vi estis inspirata de tiu malgranda spirita klasikaĵo, vi eble volas legi:

# PACO PILGRIMULO

## Ŝia vivo kaj laboro en siaj propraj vortoj

Tiun 224- paĝan libron kunmetis kvin amikoj de Paco Pilgrimulo post ŝia morto en 1981. Jen Paco parolas pri siaj spertoj kiam ŝi marŝis pli ol 25.000 mejlojn tra Norda Ameriko kiel senmona pilgrimulo, iradis ĝis estis donata tranokto, kaj fastis ĝis estis donata manĝaĵo. Ŝi parolis al miloj da individuoj kaj grupoj, donis al ili sian mesaĝon, ke la vojo al paco estas "Venku malbonon per bono, malveron per vero kaj malamon per amo".

Ŝiaj pensoj kaj senperforta agado, preĝoj, simpleco, timo, zorgo, espero, sanigo, servo kaj la vojo de amo montras la vivon de ĝojema persono. Ŝi donas ekzemplojn pri kiel agi amante kaj sentime kun perfortaj kaj konfuzataj homoj kaj rakontas pri kelkaj el siaj unikaj solvoj por la problemoj de la vivo.

Paco Pilgrimulo ofertis sian mesaĝon senkoste. Samspirite ni sendas tiun malgrandan libreton, "Paŝoj al interna paco" kaj la libron, "Paco Pilgrimulo" senkoste al kiu ajn, kiu petas ĝin. Voluntuloj kaj multaj malgrandaj donacoj ebligas tiun laboron. Ni ankaŭ eldonas la libron, "Paco Pilgrimulo" en la hispana, kaj "Paŝoj al interna paco" en la hispana, la hebrea kaj la araba. (aŭ multaj aliaj lingvoj). Pro kopioj bonvolu demandi al:

FRIENDS OF PEACE PILGRIM
Post Office Box 2207 Shelton, Connecticut 06484 USA
Telephone: (203) 926-1581
www.peacepilgrim.org friends@peacepilgrim.org

# Paco Pilgrimulo 1908- 1981

Pri ŝia pilgrimo de 1953- 1981

*Pilgrimo estas milda vojaĝo de preĝo kaj ekzemplo. Mia irado estas unuavice preĝo por paco. Se vi donas vian vivon kiel preĝo, vi intensigas la preĝon preter ĉiuj mezuroj.*

Paco Pilgrimulo iradis pli ol 25.000 mejloj, disdonante sian mesaĝon, "Tiu estas la vojo de paco: venku malbonan per amo, malveron per vero kaj malamon per amo". Alportinte en siaj tunikpoŝoj siajn nurajn posedaĵon ŝi promesis: "Mi restu vaganto ĝis la homaro akiru la vojon de paco, iradanta ĝis mi estas donita tranokto kaj fastanta ĝis mi estas donita manĝaĵo". Ŝi parolis kun homoj sur polvaj strategoj kaj urbaj stratoj, al preĝejaj, kolegiaj, civitanaj grupoj, ĉe televido kaj radio, konversacianta pri paco interna kaj eksterna.

Ŝia pilgrimo konsistas el la tuta pacobildo: paco inter nacioj, grupoj, individuoj kaj la tre grava interna paco- ĉar jen la paco komenciĝas.

Ŝi kredis, ke la monda paco venus, kiam sufiĉe multaj homoj akiras internan pacon. Ŝia vivo kaj laboro montras, ke unu persono posedanta internan pacon, povas fari signifan kontribuon al la monda paco.

---

***Paŝoj al interna paco*** ne estas kopirajtigita kaj vi estas bonvenita represi ĝin plene aŭ partojn de ĝi. Ĝi estis nun tradukitaj en 20 lingvojn kaj eldonita en pluraj landoj. Ni esperas, ke ĝi estos tradukitaj en multe pli lingvojn kaj eldonita en ĉiuj landoj de la mondo.